



3

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

M A R T O 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * * XXXV	1
* * * XXXV kongreso de la bulgaraj esperantistoj	2
Societa vivo	4
Junularo sur posteno	5
Dimo Trudoljubov. La sukcesoj dependas de la agantoj	7
Atanas D. Atanasov. Kvina leciono	8
Sergej Orlov, Canko Murgin, Simeon M. Simeonov. Versaĵoj .	10
Atanas Delčev. Per Esperanto en frata Pollando	11
Canko Murgin. La 47-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago	13
Ivan Sarafov. Grava sukceso de Esperanto en USSR	14
Nadka Gančeva. Saluton el Rostov sur Don	15
Medicina sekcio	16

Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv, 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm²; korespondanoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23-Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Jvan Palkin, Mitnaja ul. 52/54, kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



XXXV

La 35-a Kongreso de la bulgaraj esperantistoj okazos en la pitoreska urbo Burgas. En tiu grava havenurbo okazos kongreso por unua fojo en la historio de nia movado. La partoprenantoj kaj la fremdlandaj gastoj de la kongreso havos eblecon viziti kaj vidi ne nur la belecojn de la urbo mem, sed ankaŭ la jam delonge konatajn kaj lastatempe famiĝintajn somerrestadejojn de „Suna Bordo“, Sozopol, Primorsko, la fabele ĉarman riveron „Ropotamo“, la antikvan urbon Nesebâr kaj aliajn vidindaĵojn.

Ni ĉiuj esperas, ke la Kongreso en Burgas estiĝos ĝoja kaj neforgesebla festo por la bulgara esperantistaro. Garantiado por tio estas la fakto, ke ĝia aranĝo estas konfidita al unu el la fortaj societoj de nia lando kun fervoraj Esperanto-pioniroj kaj kun tre vigla junulara grupo.

Sed la Kongreso devas estiĝi ankaŭ manifestacio de nia forto, organiza kaj ideo unueco, de nia volo kaj batalpreteco por paco, socialismo, libero kaj feliĉo sur la tero. Tio dependas de la preparlaboro de la societoj, de ĉiuj esperantistoj. Organiza stabliligo, plimultigo de la membroj, socia aktiveco — jen la garantio por bona prezento al la kongreso.

Ni scias, ke niaj kongresoj estas vizitataj de multaj eksterlandaj amikoj. En tiu kongreso ili estos ne malpli, tre verŝajne — multe pli ol iam ajn. Ni devas inde prezenti nian movadon antaŭ la ekstera mondo. Jen pro kio nia alvoko estas:

Tuj al laboro! Eĉ tagon ne prokrastu la ekpreparon al nia ŝatata Esperanto-festo!

XXXV KONGRESO DE LA BULGARAJ ESPERANTISTOJ

Konforme al artikolo 10 (malnova 11) de la statuto CK de BEA kunvokas regulan 35-an kongreson de la bulgaraj esperantistoj en urbo Burgas je la 14—16 de julio j. k.

Tagordo:

1. Agadraporto de CK de BEA.
2. Raporto de la Kontrola Komitato ĉe CK de BEA.
3. Pridiskuto de ambaŭ raportoj kaj akcepto de rezolucio.
4. Elekto de CK kaj de KK.

Programo:

14. VII. 8.00 h. Skribaj ekzamenoj por instrukapablo kaj por lingva kono (la tempon de la buŝaj ekzamenoj fiksos tie la komisiono laŭ la lokaj kondiĉoj; en la sekvonta n-ro aperos la regularo de la ekzamenoj).
- 18.00 h. Solena inaŭguro de la kongreso.
- 20.00 h. Interkona vespero.
15. VII. 8.30 h. Unua laborkunsido: elekto de komisionoj, legado de la raportoj, kaj komenco de la diskutoj.
12. 30 h. Fermo de la unua kunsido.
15. 30 h. Dua laborkunsido: daŭrigo de la diskutoj; transdono de la transira flago de CK kaj de aliaj premioj al societoj gajnintaj en la organiza konkurado.
19. 30 h. Fermo de la dua kunsido.
20. 30 h. Belarta vespero.
16. VII. 8.30 h. Tria laborkunsido: fino de la diskutoj; raporto de la komisiono pri la rajtigiloj; raporto de la komisiono pri la rezolucio; voĉdonigo de la rezolucio; raporto de la komisiono pri nova CK kaj KK; akcepto de telegramoj.
- 12.00 h. Fermo de la tria kunsido.
- 14.00 h. Sekreta voĉdonado por elekto de CK kaj KK de BEA
- 15.00 h. Fakkunsidoj.
- 18.00 h. Plenkunsido de la nova CK kaj KK. Elekto de estraro kaj sekretariato.
- 18.30 h. Kvara kongreskunsido: sciigo de la balotkomisiono pri la rezultoj de la voĉdonado kaj pri la konsisto de la estraro.
- 19.00 h. Fermo de la kongreso.
- 20.30 h. Junulara vespero.

Post la kongreso, la 17-an de julio, okazos ekskursoj en la ĉirkaŭaĵoj de Burgas kaj aliaj aranĝoj sciigotaj en la venontaj numeroj.

Delegitoj

Delegito povas esti ĉiu regula aktiva membro de la societo, bone parolanta la lingvon. La delegitoj estas elektataj en ĝeneralaj antaŭkongresaj kunvenoj de la societoj. La delegitoj devas prezenti al la kongresa komisiono pri la rajtigiloj sian rajtigilon. Modelon de rajtigilo ni publikigos en la sekvonta numero de BE.

Ĉiu societo rajtas elekti po unu delegiton por ĉiu deko, aŭ parto de deko (sed ne malpli ol kvin) da regulaj membroj. Regulaj membroj estas konsiderataj tiuj, kiuj pagis sian membro-kotizon por la tuta 1962 jaro. La societaj estraroj devas pagi la membro-kotizon ne pli malfrue ol la 10-an de majo. Kotizo, pagita post tiu dato ne estos konsiderata ĉe la difino de la delegita nombro de ĉiu societo.

Aliĝo

Ĉiu regula membro de la asocio rajtas partopreni kiel gasto la kongreson. Ĉiu partoprenonto devas aliĝi en la indikita templimo, sendante al LKK en Burgas aliĝilon kaj aliĝkotizon. La membrecon konfirmas la societa estraro sur la aliĝilo. La aliĝkotizo estas: ĝis la 15-a de majo — 1 levo, ĝis la 1-a de julio 1,50 lv. Post tiu dato ne estos akceptataj aliĝoj. La aliĝiloj estos dissendataj al la societoj kaj al unuopaj esperantistoj fare de LKK en Burgas post la 30-a de marto. Ĉiu aliĝinto ricevos kongreskarton, per kiu li rajtos eniri la kongresajn kunsidojn kaj partopreni en ĉiuj kongresaj aranĝoj.

Konkurso

Dum la kongreso estos aranĝita ekspozicio de agittabuloj. En ĝi povas partopreni ĉiu societo, grupo, kurso, aŭ eĉ individuaj esperantistoj. La temoj estas: vivo la de Esperanto-societoj aŭ grupoj (kursoj, kunvenoj, brigadoj, ekskursoj, amuzoj, akcepto de gastoj, intersocietaj renkontiĝoj, partopreno en la socia vivo, en la produkto-konkurado ktp) kaj la internacia korespondado (letero, libroj kaj aliaj objektoj, ricevitaj per internacia korespondado, statistikoj pri la partopreno de la societanoj en la internacia korespondado, utiligo de la korespondaj ĵ en nia gazetaro kaj la radio ktp.). La templimo por prezento de la ekspoziciaĵoj al LKK en Burgas estas la 14-a de julio je la 13 horo. La plej bonaj agittabuloj ricevos premion.

Korespondado

Ĉion rilate al aliĝo, logado, ekskursoj ktp direktu al LKK. Ĉion rilate al ekzamenoj, la delegiteco k. a. organizaj demandoj direktu al CK de BEA. En ĉiu numero de BE aperos sciigoj pri novaj iniciatoj kaj klarigoj pri demandoj konekse kun la kongrespreparo kaj la partopreno en ĝi.

La adreso de LKK estas: **Esperanto-kongreso, p. k. 138, Burgas.**

LETERO DE LA PATRO DE LA KOSMONAŬTO

La 2-an de decembro 1961 en la nomo de la membroj de la Agrikultura Kooperativo kaj Esperanto-Societo en vilaĝo Râjevo Konar, distrikto de Plovdiv, nia s-ano St. Dargonov sendis salutleteron al la malnova esperantisto Stepan Pavloviĉ Titov, patro de la kosmonaŭto German Titov.

La 5-an de januaro 1962 estis ricevita en Esperanto sur bela bildkarto jena respondo;

„La 20-an de decembro 1961, USSR

Estimataj kamaradoj!

Mi ricevis vian leteron, kiu tre ĝojigis min.

Mi sendas al vi grandan dankon pro la varmaj vortoj, pro la bonaj sentoj, pro la amikeco, kiun mi tre ŝatas.

Stepano Titov,
eksinstruisto.

ORGANIZA VIVO

NOVAJ FREŜAJ FORTOJ EN VARNA

Nun en Varna funkcias tri kursoj. En la Supera Instituto „Dimitro Blagoev“ estas malfermita kurso, gvidata laŭ la rekta metodo de Andreo Ĉe de la novediplomita (en Druĵevo) kursgvidantino D-ro Jordanka Sirakova. Partoprenas 18 gestudentoj kaj unu civitano. Preskaŭ ĉiuj jam estas membroj de „Albatro“. Regas granda entuziasmo inter la studentoj. La plimulto el la gekursanoj komencis korespondi kun gestudentoj el aliaj landoj. Kun granda ĝojo ili montras al siaj gekolegoj neesperantistoj siajn korespondadojn kaj legas la interesajn leterojn. Jam multaj studentoj esprimis deziron lerni la Internacian Lingvon. Dum la sekvanta (somera) semestro estas planataj novaj kursoj por komencantoj, gvidataj de la subskribinto, kaj kurso por progresintoj, gvidota de Zora Mladenova-Hans.

Dua kurso funkcias en la IV-a gimnazio por civitanoj, gvidata de la ekssekretario de „Albatro“ Mara Aleksandrova. Partoprenas regule ĉirkaŭ 20 personej. La kurso estas gvidata laŭ Ĉe-metodo.

Tria kurso estas malfermita la 29-an de novembro en la poŝtoje. Ĝin gvidas Elisaveta Ruseva. Partoprenas 45 gepoŝtistoj.

La 10-an de decembro Radio-Varsovio dissendis specialan programon, dediĉitan al Varna. La programon faris Profesoŝo Jozef To-czyński el Gdansk, Pollando, en la studio de Radio-Varna dum aŭgusto ĉi-jare. En la programo partoprenis la membroj de „Albatro“ Zora Mladenova-Hans, Georgi Dimov, Asja Karajan (de armena deveno) kaj k-do Mehmed Hasanov (de turka deveno). Radio-Varna kvarfoje anoncis la disaŭdigon de Radio-Varsovio. La varnaj esperantistoj organizis kolektivnan aŭskultadon de la programo kaj sendis dank-

telegramon kaj leteron al la Esperanto-redaktoro de Radio-Varsovio.

Okaze de la naskiĝtago (15. XII) de D-ro L. L. Zamenhof, la Studenta Rondo „Studenta Amikeco“ aranĝis interesan vitrino, ornamitan per la bareliefo de D-ro L. L. Zamenhof, donacita de la sovetia esperantist-skulptisto N. Blajkov el Odeso kaj transdonita al la varnaj esperantistoj de nia fervora pacbatalantino, deputito Valja Viĉeva, aktiva membro de Esperanto-Societo „Albatro“.

La vitrino allogas la atenton de studentoj kaj profesoroj.

La 16-an de decembro la ĝejunuloj de „Verda Lumturo“ (la junula sekcio de „Albatro“) kaj de la Studenta Rondo okaze de la naskiĝtago de Zamenhof organizis kun la kom-somolanoj de kvartalo „Primorski“ amuzvesperon kun arta programo. Similaj renkontoj ĉiam vekas grandan intereson al nia afero.

Georgi Dimov

PAZARĜIK. La 14-an de decembro 1961, la Esperanto-societo „Radio“ festis en la esperantista klubejo la datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Pri la vivo de la kreinto de la internacia lingvo kaj la signifo de lia verko prelegis k-do P. Arnaudov. K-do K. Viŝegonov — malnova esperantisto rakontis kiel li fariĝis esperantisto. Same pri siaj unuaj paŝoj en la movado rakontis k-dino R. Georgieva. K-do Kr. Ĉergarov, per kelkaj vortoj, entuziasmigis nin al la porpaca batalo. La prezidanto de nia societo — k-do Iv. Vasilev proponis sendi saluttelegramon al la dua kosmonaŭto — German Titov kaj al lia patro Ste-



pan Titov, kiu estas esperantisto. Antaŭ la loka radio, same prelegis pri Zamenhof k-dino R. Georgieva. Nuntempe en la II gimnazio gvidas komencantan kurson k-do P. Arnaudov, kaj la urba kurso estas gvidata de k-do N. Angelov.

Rosica GEORGIEVA

Kazanlák. La 20-an de novembro Esp.-societo „Roza Valo“ organizis kunvenon dediĉitan al la datreveno de la historia venko de la Ruĝa Armeo kontraŭ la hitleristoj apud Volgograd. Pri la historio, la geografio kaj la ekonomio de la urbo kaj la regiono prelegis k-dino B. Rajnova. Per materialoj senditaj de k-do A. A. Popov el Volgograd oni aranĝis interesan ekspozicion. La ĉeestantaj rozvalanoj subskribis salutleteron al la volgogradaj esperantistoj.

Ĉi-jare en Kazanlák funkcias kvin kursoj por gelnantoj kaj unu por gejunuloj, gvidataj de P. Maraĝiev kaj Iv. Zahariev. Ĉiu lundo daŭre kolektiĝas la parolanta rondo.

Per bonvolaj mondonacoj la rozvalanoj aĉetis propran klubojn en la centro de la urbo. Gratulojn!

Andrej N. Pânčev

Burgas. Ni havas la ambicion aranĝi unu el la plej bonaj kongresoj. Dum oktobro ekfunkciis du kursoj. Ni organizis 10 propagandajn publikajn kunvenojn en oficejoj kaj fabrikoj. Estas fondota gelnanta grupo ĉe la societo. Ni organizas ĥoron kaj propagandan rupon, kiu interalie plenumos programojn per la loka radio. Ni preparas la grundon por malfermo de novaj kursoj. Niaj regulaj kunvenoj okazas ĉiumerkrede.

Nikola Vălčanov

ĤASKOVO. La Esperanto-movado en la urbo montras novajn sukcesojn. Por unua fojo, ankaŭ kun la helpo de la urba konsilantaro — fako pri klerigo, la loka societo sukcesis malfermi du kursojn pri Esperanto en la gim-

nazio, gvidataj de M. Uzunova kaj M. Elenov. 45 gelnantoj de la naŭa klaso komencis lerni la internacian lingvon, dezirante konatiĝi kun fremdaj landoj, akiri novajn amikojn. Iliaj revoj jam komencis efektiviĝi kun la ricevo de la unuaj leteroj el Ĉehoslovakio, Sovetunio kaj Pollando. Kiom da ĝojo alportas la unua letero! Ricevitaj esperantaĵoj, ekzemple la slovaka revuo „Ni promenu tra Slovakio“, helpas al la lernantoj ankaŭ en ilia laboro. Dank' al la korespondado la entuziasmo de la lernantoj kreskas kaj ili partoprenas la iniciatojn de la urba Esperanto-societo.

M. UZUNOVA

LASTA HORO

En la lasta momento nin trafis entuziasmiga telegramo sciiganta pri la decido de UEA-Estraro organizi la 48-an Universalan Kongreson de Esperanto dum aŭgusto 1963 en Sofio. Do, la preparo al nia enlanda kongreso estos samtempe preparo al la UK. Tuja mobilizo de la fortoj estas necesega! Detalojn ni publikigos en la sekvanta numero.

JUNULARO SUR POSTENO

JUNULARA RENKONTO EN ĤASKOVO

La 17-an de decembro la junulara grupo ĉe Esp.-societo „Asen Zlatarov“ organizis sian tradician kamaradecan renkonton por solene festi la datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Alvenis pli ol 160 gejunuloj — novaj kaj malnovaj esperantistoj kaj multaj gastoj. La prezidanto de la junulara grupo k-do Boris Kolev salutis la ĉeestantojn kaj parolis pri la verko de la kreinto de la inter-

nacia lingvo kaj pri liaj meritoj al la homaro. Oni legis ankaŭ salutleterojn el Sovetunio, Aŭstrio, Britio, Okcidenta Germanio k. a. Tre interesa estis la letero de la aŭstrian — Anton Huber, kiu priskribas siajn bonegajn impresojn pri nia lando kaj pri la bulgara junularo. Same li skribas pri la intelekta vivo de la nuntempa junularo en la okcidentaj landoj, kiu estas grave fuŝita de la tiel no-

mata laŭamerika vivmaniero. Oni recitis versaĵojn de Zamenhof kaj bulgaraj poetoj, dancis kaj amuziĝis.

B. Kolev

ESPERANTO-RONDO DE PIONIROJ

Jam pli ol jaron funkcias la Esperanto-rondo de „pioniroj“ en Gabrovo, gvidata de Elena Burmova ĉe la loka pionira domo.

La tutan interesan agadon de la rondo kronologie oni povas ekkoni foliumante ĝian taglibron. Ĝi povas rakonti pri la studado de la lernantoj, pri ilia ĝojo ĉe la ricevo de la unuaj leteroj, pri iliaj artaj programoj antaŭ la patrinaj, pri ilia fervora kolektado de feraĵ kaj paperaj restaĵoj. Unu plenplena albumo respegulas la viglajn kontaktojn de la infanoj kun samaĝuloj el la tuta mondo.

La pioniroj kelkfoje publike montris la riĉajn eblecojn, kiujn donas al ili la internacia lingvo ĉe la internaciaj kontaktoj. Pri la rondo raportis la loka gazeto „Balkansko zname“. Ĉe la festoj okaze de la dekjara datreveno de la pionira domo la infanoj sendis leterojn al siaj esperantaj amikoj. Same ili skribis al ŝtatestroj de kelkaj popolespublikoj, petante ilin esti niaj amikoj, batalantoj por tutmonda paco kaj jen... venis letero el malproksima Vjetnamio, de la Prezidanto Ho Ŝi Min. Post tago alvenas telegramo el frata Gvineo kun portreto de Seku Ture vestita en nacia kostumo. Tio estis tre agrabla surprizo kaj granda ĝojo por infanoj kaj instruistoj. Ne forgesis respondi ankaŭ k-do Janoš Kadar, kies letero estis skribita hungare kaj esperantlingve. El Pollando salutleteron sendis k-do VI. Gomulka kaj el Ĉeĥoslovakio verkistino Julia Ŝopichova.

Elena Burmova

AGADO DE BULGARINO EN MALPROKSIMA MONGOLIO

Nia kamaradino Ljubka Mladenova — estrarano de la junulara sekcio de BEA nun laboras kune kun sia edzo en malproksima Mongolio. Jen kion ŝi skribas al ni, interalie pri sia esperanta agado: „... En Mongolio ne estas eĉ unu esperantisto. Tri el miaj kolegoj ekdeziris lerni Esperanton kaj ili jam scias pli ol 250 vortojn. Mi penas esti utila al ili, tamen estas tre malfacile, ĉar mi instruas al ili per la rusa lingvo kaj mankas al ni rusa lernolibro. Mi utiligas la bulgaran. Regule mi korespondas kun germanaj, polaj, ĉeĥaj kaj ĉinaj esperantistoj. Aparte simpatiaj estas la ĉinaj kamaradoj. Mi estas ravita de ili.“ La adreso de nia kamaradino estas: Mongolio, ULAN BATOR, p. k. 780, Ljubka Mladenova.

DEBUTO DE LERNANTINO

Dum oktobro k. j. nia societo „Espero“ malfermis kurson por komencantoj en gimnazio „G. Kirkov“ kaj konfidis ĝian gvidadon al mi. Tiu kurso estas mia unua paŝo en la esperanta laboro kaj mi multe timis. Serioza malfacilaĵo estis la manko de lernolibroj, sed miaj gekursanoj estas seriozaj gelnantoj kaj ili mirinde rapide progresas. Nun post la vintra ferio ili jam atendas respondojn de iliaj unuaj leteroj el fremdlando.

Donka Petkova — lernantino

JUNULARA ESPERANTISTA TENDARO EN POLLANDO

La Junulara Palaco en Katowice organizos ankaŭ ĉi-printempe, de la 1-a ĝis la 10-a de aprilo, internacian junularan esperantistan tendaron. La partoprenantoj loĝos en bona ripozdomo en la montara ripozloko „Wisla“ en Beskidoj, proksime al la ĉeĥa landlimo. La celo de la tendaro estas simple paroligi la junulojn kaj krei atmosferon de internacia amikeco, do ĝi havos karakteron antaŭ ĉio amikecan. Jam anoncis sian partoprenon hungaraj, orientgermanaj, jugoslavaj kaj italaj gejunuloj.

La estraro de la junulara sekcio de BEA decidis sendi al la tendaro en Pollando, kiel reprezentantojn de la bulgara esperantista junularo, k-dinoj Petja Kraĉeva el Jambol kaj Donka Petkova el Loveĉ, ambaŭ tre sukcese finintaj la kurson por kursgvidantoj en Druĵevo dum 1961 j., bonegaj lernantinoj kaj fervoraj esperantistinoj.

„RADAR“ — KIAL NE EN ESPERANTO ?

„RADAR“ estas la nomo de pola ilustrita porjunulara revuo, kiun oni eldonas en pola, angla kaj germana lingvo. La enhavo de la revuo estas varia kaj interesa. Oni publikigas multajn adresojn de korespondemuloj el la tuta mondo. Niaj polaj amikoj strebas konvinki la redakcion, komenci la eldonadon de tiu revuo ankaŭ en Esperanto. Pro tio ili petas la junularajn esperantistajn grupojn kaj apartajn esperantistojn bombardi la redakcion per leteroj recenante la revuon, se ĝi plaĉas al ili kaj demandante eventualan esperantan eldonon. Tia kampanjo multe helpos ilin. La adreso de la redakcio estas: „RADAR“, Warszawa, ul. Smolna 43.

*Amase al la balo
en Ruse !*

LA SUKCESOJ DEPENDAS DE LA AGANTOJ

(Intervjuo al la prezidanto de la Esperanto-Societo Maksim Gorkij en Jambol)

De antaŭ unu jaro Esperanto-Societo „M. Gorkij“ en Jambol havas prezidanton la juna kaj nova esperantisto k-do Dimo Trudoljubov. Dank' al lia fervora agado, la societo en Jambol plifortigis rapide kaj okupis unu el la unuaj lokoj inter la landaj societoj.

Dezirante transdoni la pozitivan sperton al la aliaj societoj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ direktis al k-do Trudoljubov kelkajn demandojn. Ĉi-sube ni prezentas la demandojn kaj la respondojn.



Demando. K-do Trudoljubov, dum la pasinta jaro vi triobligis viajn membrojn. Cu vi povus rakonti al niaj legantoj, kiamaniere vi atingis tiujn grandajn sukcesojn?

Respondo. Nia societo dum 1960 estis tre malforta. Ĝiaj membroj estis precipe maljunaj homoj. En la fino de 1960 ĝi havis 32 anojn. Ĉirkaŭ 20 membroj ĉeestis la jarkunvenon de la 3. Il. 1961, kiu elektis novan estraron. En la fino de junio, la pasintan jaron, la Esperanto-Societo „Maksim Gorkij“ — Jambol kaj la Esperanto-Societo „Nigra Maro“ — Burgas, faris kontrakton por konkurado. Tiu konkurado estas la stimulo de niaj sukcesoj.

En la komenco de la lernjaro la kontrakto por konkurado estis pridiskutita en ĉiuj 8 kursoj, organizitaj de la societo. Ni starigis la demandon kiel honoron por la urbo kaj por la distrikto. Estis faritaj kontraktoj por konkurado inter la kursoj, kies pli gravaj indicoj estas jenaj: a) plej regula okazigo de la kursaj lecionoj; b) societigo de la kursanoj; c) ties abonigo al „Bulgara Esperantisto“; ĉ) komunaj vizitoj de teatro kaj kino; d) partopreno en ekskursoj; e) disaŭdigitaĵoj per la loka radio programoj k. a.

Dank' al tiu konkurado tutaj kursoj sen ia ajn escepto, kiel tiuj de D. Bogdev, S. Kănev, Z. Stoilova, P. Kračeva, D. Trudoljubov societaniĝis. Tiamaniere ni sukcesis plimulti la membrojn de 32 al 175.

Demando. Via societo atingis grandajn sukcesojn ankaŭ en la varbado de abonantoj de nia ŝatata presorgano „Bulgara Esperantisto“. Multaj estraroj plendas, ke ili ne povas varbi abonantojn inter la novuloj, ĉar oni ne komprenas ĝin. Kiel vi konvinkis la homojn aboni?

Respondo. Por abonintoj de „Bulgara Esperantisto“ ni varbadis ne nur maljunajn esperantistojn, kiel Angel Stojanov, vicprezidanto

de Distrikta Popola Konsilantaro, Trendafil Gramatkov, estro de Fako „Popola Sanprotekt“ en la Distrikta Popola Konsilantaro, Georgi Văjarov, direktoro de Popola Teatro en Jambol ktp. Ni speciale varbadis por abonintoj de „Bulgara Esperantisto“ grandan parton de la ĝejnuloj-gekursanoj, ĉar ni opinias, ke tiamaniere, legante la revuon, ili fariĝos pli bonaj esperantistoj. Ni invitas kaj persvasas ĉiun esperantiston.

Dank' al tio ni sukcesis plimulti la abonintojn de 19 por 1961 al 61 por 1962.

Demando. Ĉu via societo partoprenas en la socia vivo de la urbo? Kiaj estas la rezultoj?

Respondo. Dank' al tio, ke la membroj de nia societo organizite partoprenis en la tutpopolaj manifestacioj de Naŭa de Septembro kaj Unua de Majo organizis labortagojn, publikajn kunvenojn, multajn disaŭdigojn per la urba radio — ĉio ĉi levis la aŭtoritaton de la societo. Nun ĉiuj urbaj kaj distriktaĵaj gvidantoj parolas pri Esperanto kun estimo, kaj ni fieras pri tio. Per la loka ĵurnalo „Naroden Drugar“ (Popola Kamarado) ni diskonigis nian agadon, pri nia societo jam scias en la distrikto. Tio plej bone evidentiĝis ĉe vendado de la markoj-brikoj. Ekzemple, la prezidanto de la Agrikultura Laborkooperativo en vilaĝo Straĝa Stajko Dinev aĉetis 400 markojn-brikojn, la prezidanto de la Kooperativo en vilaĝo Bojaĝik Ivan Dimitrov — 250, la prezidanto de la Kooperativo en vilaĝo Tenevo Martin Kolev — 250 ktp.

Ni estas tre kontentaj, ke nian societon eniris freŝa forto — junaj esperantistoj. Niaj maljunaj esperantistoj en Jambol transdonas al ili sian multjaran sperton.

Nia estonta agado dum la kuranta jaro pasos je la honoro de 35-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Burgas.

MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Kvina leciono

Depost du monatoj mi lernas la internacian lingvon. Mi vizitas vesperan kurson de Esperanto.

La kursejo troviĝas en la gimnazio. La direktoro de la gimnazio rilatas simpatie al Esperanto. Same rilatas al ĝi la plimulto de la instruistoj. Ili volonte disponigis por la kurso unu el la klasĉambroj.

Mi deziras konigi al vi per kelkaj vortoj la kursejon: vasta ĉambro en la dua etaĝo de la gimnazio, kun duklapa pordo, tri larĝaj fenestroj, kiuj rigardas al sudo kaj donas abundan lumon. Dudeko da benkoj en du vicoj; ĉiu benko estas por du personoj. Antaŭe — la katedro kaj la seĝo de la instruisto. Sur la muroj pendas kelkaj portretoj kaj bildoj. Unuvorte — hela ejo, kiu agrabligas la laboron.

Tra la fenestroj oni povas vidi la grandan urban preĝejon, la unuagradan lernejon kaj iom pli malproksime ankaŭ unu presejon. Vidigas ankaŭ la tegmento de pluraj domoj kaj malantaŭ ili — vasta parko — la urba promenejo.

Ĝis nun ni havis 21 lecionojn. Ni jam ellernis la pli grandan parton de la gramatiko; restas ankoraŭ kelkaj reguloj, kiujn ni facile lernos, kaj ankaŭ kvanto da afiksoj. Sed ni povas kompreni bone preskaŭ ĉian esperantan tekston.

Mi konvinkigis, ke Esperanto estas la plej facila el ĉiuj lingvoj en la mondo. Krome ĝi posedas aliajn tre valorajn kvalitojn, ĝi povas riĉigi la homan intelekton, faciligi kaj plimultigi la internaciajn rilatojn. Al mi kaj al miaj gekamaradoj en la kurso tre multe plaĉas la lingvo mem kiel lingvo kaj ankaŭ ĝia nobla celo kaj ni jam fariĝis fervoraj esperantistoj.

Mi penas interesigi pri Esperanto ankaŭ miajn gepatrojn kaj miajn gefratojn. Mia familio aŭdas de mi preskaŭ ĉiutage sufiĉe da laŭdoj pri Esperanto.

PROVERBOJ

Preĝejo proksima, sed dio malproksima.

Feliĉo fierigas, malfeliĉo saĝigas.

Kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas.

Geedzoj en paco vivas en palaco.

Notindaj vortoj kaj esprimoj

Pluraj domoj = pli ol unu domo (povas esti du, tri, kvar ktp., sed ne nepre multaj).

Kelkaj = pli ol unu, ol du, tri ktp. — sed ne multaj.

Kelka — kelkaj = ioma, nedifinita, sed ne multa kvanto aŭ nombro (da aĵoj)

Unusilaba vorto — dusilaba, trisilaba, plursilaba, multsilaba.

Krome = krom tio.

AFIKSOJ

SUFIKSOJ: ej, ig, iĝ

EJ — Loko, en kiu oni faras ion, ekzercas iun profesion (dormejo, presejo, lernejo, laborejo); kie sin trovas io (grenejo, fruktejo). Plej ofte estas komprenata fermita loko — kun muroj kaj tegmento, sed estas kazoj ankaŭ de pli larĝa uzo: ĝenerale spaco, destinita por io aŭ karakterizata per io (denesejo, tombejo = tombaro, herbejo — en senco de herbokampo).

IG — Fari ion aŭ iun esti ia aŭ ricevi certan kvaliton, aŭ fari ion:

Pur-ig-i = fari ion (iun) esti pura.

Blankiĝi = fari blanka, igi blanka.

Junigi = fari iun esti juna.

Venigi = fari iun veni, instigi iun veni;

IĜ — La persono aŭ la objekto, pri kiu rilatas la vorto, ricevas la kvaliton esprimitan per la radiko, kun li okazas tio:

Pur-ig-i = ricevi kvaliton „pura“.

Blankiĝi = ricevi blankan koloron.

Fariĝi = komenci esti.

Junigi = fariĝi juna.

Leviĝi = levi sin.

Sidiĝi = komenci esti en sida stato, komenci sidi.

Stariĝi = komenci stari.

Memstara uzo de IGI kaj IĜI: Mi igas ion pura = Mi purigas ĝin. Mi iĝas pura = mi puriĝas, mi fariĝas pura. Mi igos lin lerni = mi lernigos lin, mi instigos lin lerni.

Mi aliĝas al la esperantista societo = mi fariĝas membro de la esperantista societo.

Mi forigas ion = mi malproksimigas ĝin, mi lasas, ĵetas ĝin for.

PREFIKSO: ge

Gepatroj = patro kaj patrino kune, ambaŭ.

Gefratoj = frato kaj fratino, fratoj kaj fratinoj.

Gesinjoroj.

Gekamaradoj.

EKZERCOJ

Li faras la muron esti blanka = Li ... la muron.

Vi faras la tabulon esti nigra = Vi ... la tabulon.

La knabo faras siajn ŝuojn puraj = La knabo ... siajn ŝuojn.

La bona mango faros lin esti forta = La bona mango ... lin.

La pura aero faros ŝin (esti) sana = La pura aero ... ŝin.

La instruisto igas la lernantojn kanti = La instruisto ... la lernantojn.

Nia instruisto igas nin paroli en Esperanto = Nia instruisto ... nin en Esperanto.

Mia amiko igas nin ridi = ...

La knabo iĝas jam granda = La knabo jam ...

Vi iĝas (fariĝas) pli alta = Vi plialt ...

Mia avo fariĝas maljuna = Mia avo ...

Ĉu vi jam iĝis sata? = Ĉu vi jam ...?

Mi ne povas vidi la preĝejon tra la fenestro de mia ĉambro: de tie ĝi ne vid ...

La kudristo laboras en ...

Oni preĝas en ...

Ni tenas la fojnon en ...

Onklo kaj onklino estas ...

Knabo kaj knabino estas ...

Edzo kaj edzino estas ...

ĈU VI SCIAS?

En la akvoj de la japanaj maroj vivas malgrandaj fiŝoj. Ili movas sin maltrankvile kaj saltetas kelkajn horojn antaŭ tertremo kaj per tio alarmas pri la proksimiĝanta danĝero.

* * *

Estas serpentoj, kiuj elĵetas venenon je distanco de kvar metroj. Tri generoj el tiuj serpentoj, nomataj kobroj, vivas en la tropikaj arbaroj de Afriko kaj de Suda Azio. Se la elĵetita veneno ne trafas la predon, la kobro ripetas la elĵeton. Falante en la okulon, la veneno penetras en la sangon de la viktimo, blindigante la grandajn bestojn kaj mortigante la malgrandajn.

* * *

La pitono estas giganta serpentsimila nevenena reptilo, loĝanta en la varmaj regionoj. Ĝi atingas 8—10 metrojn de longo kaj 0,80 m. de perimetro. Ĝi posedas nekompareblan muskolan forton. La kaptitan predon ĝi mortigas premante ĝin per siaj vertebroj.

Antaŭ kelkaj jaroj indoneziano de la insulo

FONDUSO „MONTODOMO ESPERANTO“

Bogdana Bajdanova, Sofia	5,00 lv.
Vladimir Ŝulgovski, Sofia	5,00 „
Rangel Dragov, Sofia	2,50 „
Radka Blāskova, Sofia	2,00 „
Lazar Mladenov, Sofia, kolektis	25,00 „

La Konstrua Komitato varme dankas al la novaj donacintoj.

Novajn kontribuojn oni sendu al p. k. 44, Sofia.

Nik. Nikolov

Flopek kaptis pitonan idon. Li komencis zorgeme eduki la kreskantan pitonon, nutrante ĝin per lakto kaj fruktoj. Nun la pitono estas humila kaj obeema dombesto, longa ses metrojn kaj peza 140 kg. Ĝi fervore helpas sian mastron kaj edukiston en la agrikultura laboro. Grimpante sur la arboj, la pitono mal-suprenfaligas de la branĉoj nur la maturajn fruktojn.

Sergej Orlov

AL LA PARTIO

Al ĝi dediĉas ŝtalon laboristo,
kaj grenon selektitan — kamparan';
rekordon en flugad' — aviadisto,
pentristo bildon, de l'verkist' — roman'.

Kaj ĉio digna, kio gloras homon,
en kio bolas pens' kaj ardas la labor',
de la scienco heroa' — senmorta —
la voj' al kosmo — nur al ĝia glor'.

Ĉi estas ne rutin, sed akt' de l'kor' kaj volo —
ja la partion konas bone ni:
fordonas ĉion ĝi por bono de l'popolo
kaj per popola fort' potenca estos ĝi.

El la rusa: **IDA LISIČNIK**

Canko Murgin

Ĉ U ?

Ĉu vespero estis bela,
ĉar ni ambaŭ estis kune —
aŭ ĉu ĉar la brilo luna
flustris al ni amfabelon ?

Nun diveni malfacilas —
mi ne konas la motivon,
sed verŝajne flam' de l' vivo
nin inspiras kaj konsilas.

Sur hararo via blonda
lasta sunradio rajdis
kaj al mia kor' ektaĵdis
vervo el Parnasa Mondo.

Ĉirkaŭ ni trankvilo dormis,
super ni ĉielo bluis —
vivrivero ritme fluis,
sed en mia brusto ŝtormis...

Ĉu vespero estis bela,
ĉar ni ambaŭ estis kune —
aŭ ĉu ĉar la brilo luna
flustris al ni amfabelon ?

Simeon M. Simeonov

SAVRIMEDO

Treege min doloris
la kapo kaj mi ploris.
Finfine mi komprenis:
terura lukt' okazas
en mia cerb' — ĝin kaŭzas
bacilo tre konata —
„DISPUTO ITA-ATA“:
Okuloj miaj larmis
kaj io min alarmis.
Cerbĉeloj miaj sperte
pri helpo petis certe —
pri doz' de aspirino...
Sed ve, ne venis fino
de kapdoloro mia
(malsan' epidemia!).
Kaj sperta kuracisto,
kvankam ne lingvisto,
pri „ita-at“ eksperto,
kun longa vivosperto,
post trafa diagnozo
konsilis: „Nur ripozo“.
Malsanon nomis: „SEKTO“
kaj diris: „Nur neglekto
al gramatikproblemoj —
de malkonkordo semoj!“

La kuracisto fama
(esperantist' iama...),
kun stranga vivkoncepto,
preskribis per recepto
al mi medikamenton:
al „ITA“ — malatenton,
al „ATA“ — naŭzosenton
kaj eĉ — indiferenton!

Sed venis la printempo:
por am' kaj paco — tempo...
Kaj grip' epidemia
atakis nin per sia
bacilo tre danĝera,
nomata „AMBAŬ“ — vera
kaj nova „mortiganto“
de lingvo Esperanto...
Sed... savrimed' ekzistas —
ĝi al la grip' rezistas:
per sama kuracilo
pri ĉiu ajn bacilo —
la nom': „INDIFERENTO“
AL ĈIU SEKT-AGENTO!.



PER ESPERANTO EN FRATA POLLANDO

Al Krakovo — Zakopane

De Katovice per luksaj aŭtobusoj de „Orbis” ni ekveturis tra Krakovo, kie ni iomete ripozis kaj tagmanĝis, rekte al Zakopane en la Tatra-montaro, kie ni devis ripozi kelkajn tagojn en la ripozdomo de la Krakova Urba Konsilantaro. Tie ĉi ni estis agrable surprizitaj: alte sur la balkono flirtis la bulgara nacia standardo kaj staris la surskribo „Ni salutas la kamaradojn el Bulgario”.

Urbo Zakopane situas en la Okcidentaj Tat-roj. En la proksima pasinteco ĝi estis vilaĝo, hodiaŭ ĝi estas 50 000-a moderna urbo. Prave oni ĝin nomas perlo de la Tatra-montaro, ĉef-urbo de la altmontara turismo. Vintre tie ĉi estas la regno de la ski-sporto. Dum la venonta jaro tie ĉi okazos la grandaj internaciaj ski-vetludoj. En la pasinteco tie ĉi ripozis la pola aristokratio, hodiaŭ — la laboristoj de la fabrikoj, minejoj k. c. Belegaj ŝoseoj, multaj aŭtobusoj ebligas al ĉiu turistoj esplori la tutan regionon. Ni vizitis la tattran muzeon, fonditan de la fama pola kuracisto D-ro Haubinski. La tatra muzeo raspegulas la tutan tatra-regionan vivon. En la solida trietaĝa konstruado ni vidas la plej malnovajn produktilarojn de la Tatra-montanaro. Estas bone prezentita ankaŭ la flaŭro kaj la faŭno de la Tatra-regiono (ursoj, lupoj, ŝiuroj k. c.).

„Mara Okulo” — belega perlo de la Tatra-montaro, lasis en nia memoro neforge-seblan impreson. Ĝi estas borderita de grandegaj ŝtonegaj muroj, tra kiuj kuras torentoj al la lago.

En la Muzeo de Lenin

Revenante de la „Mara Okulo” ni havis la plezuron viziti la Domon-muzeon de la granda proleta gvidanto Lenin en vilaĝo Poronin. Lenin loĝis tie ĉi dum la jaroj 1913/1914. Antaŭ malgranda, artefarita lageto staras la bela monumento de la genia revoluciulo Lenin. La muzeo estas tipa Tatra-konstruaĵo kun akraj tegmentoj. Sur la memortabulo estas skribita „Vladimir Iliĉ Lenin — kreinto de la Komunista Partio”. En la ĉambroj estas multaj fotoj el la tiutempa vivo de Lenin. Estas interesa la letero de Lenin al Gorkij, datumita je aŭgusto 1914. En la sama ĉambro estis organizitaj la kunvenoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio, kaŝe de la aŭstria policanoj (la regiono tiutempe estis sub aŭstria regado). Ni supreniris al la dua etaĝo. Tie ankaŭ estas multaj interesaj dokumentoj kaj belega busto de Lenin. Rigardante ĝin, kvazaŭ Lenin reviviĝis, kvazaŭ li rigardas nin... fotokopiaĵoj de la ĵurnalo „Pravda” de 1913. La dormoĉambro de Lenin ankaŭ estas tre simpla. Unu fotografajo

prezentas la malliberejon en Novi Targ, kie Lenin restis arestita de la aŭstria polico. Altiras nian rigardon la protokolo de la polica pride-mando de Lenin. En la laborkabineto de Lenin estas ankaŭ diversaj tiutempaj gazetoj, ĵurnaloj k. a. dokumentoj. „La Stato kaj la Revolucio”, „La Infana Malsano de la Socialdemokratio” Lenin skribis en la sama ĉambro.

Ni ĵetis rigardon al la pitoreska Tatra-montaro de la sama fenestro, tra kiu Lenin rigardis la monton, pripensante sian estontan agadon. Apud la ŝtuparo estas malgranda benko, sur kiu Lenin ŝatis sidi kaj pensi pri diversaj problemoj.

Krakovo — la slava Romo

Dum kelkaj tagoj ni trarigardis, esploris tiun ĉi ege interesan miljaran urbon. Nun por la vizitanto de la urbo plej granda intereso prezentas la reĝa kastelo Vavel, konstruita sur samnoma valetio, apud rivero Visla. La vavela kastelkomplekso estas konstruita precipe en stilo renesanca. Rigardante Vavelon, ni similigas ĝin al nia Rila Monaĥejo. Dum XVII jarcento en la Krakova kroniko estis skribitaj malhelaj paĝoj. La urbo suferas por malsan-epidemioj. La sveda okupado ankaŭ malbone influas. Multaj valoraj konstruaĵoj estis detruitaj. Dum la XVIII jarcento la urbo estis denove atakita de fremdlandaj armeoj. En la jaro 1794 sur la centra bazarplaco potence kaj fiere eksonoris la alvoko de pola nacia heroo Koŝcuŝko, kiu proklamis la naciliberan batalon. Inter 1803—1813 Krakovo apartenas al la Varsovia Duklando. En 1815 Viena Kongreso proklamis Krakovon kiel sendependan urbon. Dum tiu periodo en la urbo estis konstruitaj multaj belegaj domoj. Krakovo ofte estis centro de revoluciaj bataloj. Dum 1846 la urbo iĝas areno de ribelo subtenata de la Krakova malriĉularo. La revoluciuloj konkeris la urbon. La feŭda socia ordo estis neniigita. Malgraŭ ke la ribelo malsukcesis, kiel trafe rimarkas Karlo Marks, la krakovaj herooj faris gravan paŝon. Dum la XIX jarcento la urbo rapide industriiĝas, ankaŭ la bataloj de la laboristaro oftigas. Grava momento en la historio de la urbo estas la ĉeesto de Vladimir Iliĉ Lenin en la urbo dum la jaro 1912—1914. En la jaro 1923 la krakova laboristaro denove ribelas kontraŭ la burĝa-ŝliĝanta ordo. Sekvas amasaj strikoj. Per teroro kaj sangoverŝo la ribelo estas venkita.

La Dua Mondmilito komenciĝis sur pola tero. Krakovo spertis la sorton de la Pola Patrijo. En Krakovo estis la sidejo de Hitlera

Dum vojaĝoj en multaj partoj de la mondo, mi parolis kun sennombraj esperantistoj — japanaj, eŭropaj el preskaŭ ĉiu lando — kaj konstatas ke la plejsper-taj ja havas veran internacian parol-manieron. Neniel oni povas diri ke tiu venas el tia lando, ĉar la elprononcado estas unika. Sed kvankam tia plezuro estas reala, tamen en ĉiu lando ekzistas komunaj eraroj de elprononco aŭ de misuzo de vortoj, pro la nacia lingvo.

Eble interesos la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ sciigi pri miaj notoj, faritaj dum la feliĉaj semajnoj, kiujn mi pasigis antaŭ du jaroj ĉe ili. Pluraj diris al mi ke la unuan fojon ili aŭdas alilandulon paroli la internacian lingvon; do jen kelkaj impresoj:

1. Vi ofte forlasas la subjekton de frazo kiam estas pronomo. Ĉe lingvoj, en kiuj la verbfinajo varias, indikante la subjekton, tia ellaso estas normala kaj korekta. Sed en Esperanto ni nepre esprimu, **kio** faras la agon. Ekzemple: „Iras al la klubo“ ne sciigas, ĉu mi aŭ vi, aŭ ŝi, aŭ li estas la foriranto.

2. La pridiritajn verbfinajojn -as, -is, -os oni tro ofte elprononcas malnete en Bulgario, do la alparolito ne aŭdas ĉu la amiko iras hodiaŭ, iris hieraŭ aŭ iros morgaŭ. La tri vokaloj estas tre malsamaj, do ni diru tutklare a, i aŭ o.

3. „Ĉu vi estas mem?“ oftege oni surprize diris al mi. Nu, diris mi al

mi, tute nature mi estas mi mem! Nur post multfoja ripetado mi komprenis, ke oni deziris scii, ĉu mi estas **sola**, ne kun amiko. Kial la geamikoj surpriziĝis, ke mi vojaĝas sola, ili neniam klarigis al mi.

4. **Virino** estas iu ajn el niaj patrinoj, fratinoj, amikinoj, do tute ne plaĉas aŭdi „Jen mia virino“, anstataŭ „Jen mia edzino“. Iomete ŝokas, surprizas, ĉar la esperanta vorto „edzo“ sonas agrable kaj efektive estas unika. Laŭ la eminentuloj de nia movado, Zamenhof kreis la vorton „edzino“ el la fino de la germana vorto „Princino“. Poste li virigis ĝin por fari „edzo“n. Do estas la kontraŭo de la biblia fantazio! Esperante la viro kreiĝis el la virino, kaj mi petegas vin, bonaj kamaradoj bulgaroj, ne uzu „virino“, kiam vi priindikas „edzinon“.

Tre ofte la kontraŭuloj de Esperanto moke diras, ke ĝi baldaŭ disfalos en dialektojn. Ĝis nun, certe ne estas vere; neniam estos se vi kaj mi, ordinaraj esperantistoj, homoj de la strato, detale prizorgos la puran elprononcadon.

Alfred G. Tucker,

ano de la Brita Societo por Amikeco kun Bulgario

ALVOKO AL SUPERAJ LERNEJOJ KUN INSTRUATA ESPERANTO

regiona ĉefo, sed la urbo estis feliĉa savi siajn multnombrajn monumentojn dank'al la Ruĝa Armeo, kiu rapidege ĉirkaŭis la urbon kaj la hitleranoj forkuris tiel rapide, ne havante eblecon detruiri la urbon. Hodiaŭ la urbo sin prezentas kiel urbon-maljunulon, urbonmonumenton, trafe nomita de Mickieviĉ „Slava Romo“.

Atanas VÂLĈEV DELĈEV

Ĉe Slonsk'a Politekniko en Gliwice (Pollando) jam duan jaron funkcias esperanta lektorato. Plua fruktodona evoluo de la lektorato dependas interalie de personaj internaciaj kontaktoj de ĝiaj partoprenantoj kun studentoj kaj junularoj en aliaj landoj. Ni volas kontaktigi kun studentoj kaj junularaj organizoj de ĉiuj superaj lernejoj, kie Esperanto estas instruata por priparoli la kondiĉojn pri starigo de la ĉiujara interŝanĝado de la studentoj-esperantistoj. Precipe nin interesas popoldemokratiaj landoj kaj Sovetunio. Skribu tuj al jena adreso: Rada Uczelniana ZSP, Gliwice, ul. Strzody — SDK, Pollando.



GEOGRAFIA SEMAJNO EN ODENSE, DANLANDO

Dum la antaŭkongresa semajno (28/7—4/8 1962) okazos la Kvara Internacia Geografia Semajno en tipe dana popol-altlernejo: **Husmandsskolen** apud la urbo Odense, ĝuste en la centro de Danio. La gelernejestroj **Gronborg** bone konas Esperanton, kaj ilia tute moderna lernejo kun grandega parko prezentas tre taŭgajn eblecojn por studado, ripozo kaj gaja somerumado. Aparte oni povos studi danan agrikulturon kaj kooperadon, ĉar la lernejo posedas modelan bieneton.

Prelegoj okazos i. a. pri la Balkana folkloro, Sociologiaj fenomenoj en Bulgario, Afriko sub naciaj koloroj, Dano rigardas Ĉinion, Esperanto en geografia instruado, Fungo-narkotikoj, Filmoj kaj multaj kolorbildoj kompletigos la temojn. Vespere aperos „Parolanta Geografia Revuo“ pere de la partoprenantoj, de kiuj oni cetere akceptas aliajn popularajn preleg-proponojn, tiel ke la programo certe povos kontentigi ankaŭ nefakulojn.

Ekskursoj estos tra la dolĉa, ebena pejzaĝo al antikvaj memoraĵoj (vikinga ŝipo en tomb-altaĵo), mezepokaj kasteloj, grandega ŝipfarejo ka. — En Odense oni rigardos la naskiĝdomon kaj la muzeon de la plej fama dano: Hans Christian Andersen.

La prezo estos 175 danaj kronoj por plena gastigo en dultitaj ĉambroj, ekskluzive de ekskursoj. Ne membroj de Internacia Geografia Asocio krompagu 5 danajn kronojn.

Plurajn informojn kun aligilo petu — se eble aldonante respondkuponon — ĉe la organizantoj: **Roma kaj Poul Thorsen, instruistoj pri geografio, Dyblandsvangen 7, Kopenhago, Brh.**

LA 47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN KOPENHAGO

Laŭ decido de la Komitato de UEA, la 47-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1962. Pasintan jaron okazis ŝanĝo en la Kongresa Regularo. Nun nur la esperantistoj el la lando, kie okazos la kongreso, pagas al la Kongresa Komitato en Kopenhago en danaj kronoj. Ĉiuj alilandaj aliĝintoj al la kongreso pagas rekte al UEA en Roterdamo, Nederlando. Ĝis la fino de marto 1962 la aliĝkotiĝo estas 46 nederlandaj guldenoj aŭ 88 danaj kronoj. Post tiu dato la kongreskotiĝo plialtiĝas je 51,50 nederlandaj guldenoj aŭ 98 danaj kronoj. La individuaj membroj de UEA ĝuas rabaton de 5 nederlandaj guldenoj aŭ 9,50 danaj kronoj.

La dana ŝtatfervojo donos al la kongresanoj irrevenan bileton per rabato de 35%.

En la kadro de la kongreso okazos la 7-a Infana Kongreseto por geknaboj de 6 ĝis 13 jaroj. Okazos multaj fakkunvenoj. La Mondpaca Esperantista Movado (MEM) ankaŭ organizos sian kutiman kunvenon. Tamen ĉar la esperantistoj jam multe pli ol en la pasintaj jaroj interesiĝis pri la problemoj de la paco, eble MEM okazigos pli ol unu kunvenon. La partoprenantoj de UEA-kongreso, kiuj intencas viziti la MEM-kunvenon estas petataj anonci sian partoprenon al MEM, Box 1025, Kopenhago, Danlando.

Canko Murgin,
prezidanto de la Mondpaca
Esperantista Movado

*Ĉu vi abonigis vian amikon
al „Bulgara Esperantisto“?*

Antaŭ nelonge en USSR kiel eldono de la Instituto por Internaciaj Rilatoj en Moskvo aperis la libro „**Fundamento de Esperanto**“ (Основы Эсперанто) de Ivan Vladimiroviĉ Sergeev. Tio estas tre grava sukceso de Esperanto en la granda frata lando, kiu havos fortan influon por plua disvolvigo de la internacia lingvo en Sovetunio. Eble niaj legantoj bone memoras, ke en 1957 tie aperis la broŝuro pri Esperanto de Andreev, kiu en treege mallonga tempo elĉerpigis. Ankaŭ nun ni ekscias, ke la libro de k-do I. V. Sergeev jam estas elĉerpita. Tio estas ĝojiga fakto, sed tiu fakto ankaŭ pruvas, ke la sovetiaj esperantistoj devas streĉi siajn fortojn kaj energie klopodi kaj eldoni novajn esperantajn lernolibrojn.

En la libro la aŭtoro donas la fundamentajn gramatikajn kategoriojn.

Post la gramatika parto sekvas diversaj tekstoj, kiuj vere prezentas malgrandan krestomation. Pri la bona elekto de tiuj tekstoj ni speciale gratulas k-don Sergeev. Ekzemple estas donitaj: elektitaj pensoj, proverboj, versaĵoj de Puŝkin, Ŝekspiro, Ezopo, M. Isakovskij, L. Dmiterko, diversaj aliaj pecoj el la bulgara literaturo (popola fabelo), el la ĉina literaturo (fabeleto), el la persa poezio, diversaj materialoj, pri la pacmovado kaj kelkaj etaj anekdotoj.

En la fino de la libro estas donitaj Esperanto-rusa kaj rusa-esperanta vortaretoj.

Ni esperas, ke en plej proksima tempo en USSR aperos novaj esperantaj lernolibroj kaj vortaroj, pri kiuj fieros ne nur la sovetaj esperantistoj, sed ankaŭ la esperantistoj el ĉiuj popoldemokratiaj landoj kaj samtempe la progresemaj esperantistoj el ĉiuj landoj de la mondo.

Ivan SARAFOV

En Ĉeljabinska distrikto estas regiona centro, granda vilaĝo Varna. Antaŭ nelonge tie ekfunkciis Rondeto „Esperanto“ en Domo de la Pioniroj. La membroj de la rondeto faris murgazeton „Esperanto“. En ĝi estas propagandaj materialoj: pensoj pri Esperanto de Gorkij, Tolstoj, S. P. Titov (patro de la dua kosmonaŭto). En centro de la gazeto estis vortoj de V. I. Lenin: „Esperanto estas latino de la proletaro“. En la gazeto estas datoj el la vivo de L. L. Zamenhof, artikolo „Kion oni devas koni pri Esperanto“, ktp. La murgazeton en la loka mezlernejo oni legis kun granda intereso. Aninoj de la rondeto faris en X klaso de la lernejo paralelan Esperanto-varion de la klasgazeto „La scio estas forto“. Nun rondetanoj volas korespondi kun ĉiuj landoj. Ili deziras ricevi precipe leterojn el bulgara Varna kaj Kubo. Adreso: USSR, Ĉeljabinskaja obl., s. Varna, Pionir-Domo, Esperanto.

V. ROĴESTVENSKIJ

NOVA ELDONO DE „FUNDAMENTO DE ESPERANTO“

D-ro Andreo Albault (Albo) en Tuluzo, Francio, preparas reeldonon de la „Fundamento de Esperanto“; la nova eldono estos fotografa reprodukto de la unua eldono. Krome, la eldona libro enhavas ankaŭ la publikigitajn ĝis nun (kaj jam delonge elĉerpitajn) korektojn kaj ĝustigojn de la nacilingvaj tradukoj de la radikoj en la Universala Vortaro, aprobitajn sisteme de la Lingva Komitato.

*Kiom da abonantoj
vi varbis?*



Esperanto gajnas multajn adeptojn ankaŭ en la studentaj medioj en nia lando. En la aŭtuno de 1961 en la Universitato de Varna estis malfermita kurso por komencantoj, gvidata de k-ino D-ro Jordanka Sirakova, laŭ la rekta metodo. La kurson partoprenas regule 20 gestudentoj.

La 5-an de decembro la gekursanoj, kiel ordinare, kolektiĝis en aŭditorio 209, kie oni gvidas la kurson dufoje semajne. . . Subite la pordo malfermiĝis kaj en la ĉambron eniris k-do Georgi Dimov akompanata de du nekonataj kamaradoj. Unu el ili portis magnetofonon. La lektorino D-ro Sirakova prezentis al ni la gastojn. Ili estis malnovaj esperantistoj de la loka Esperanto-societo „Albatro“. Ili silente eksidis sur la lastaj benkoj kaj atente aŭskultis la lecionon.

En formo de agrabla konversacio pasis la lecionaj minutoj. Ĉe la fino de la leciono k-do Vasil Kostov malfermis la magnetofonon. Verdire, ni supozis, ke oni prezentos al ni dancmuzikon. Sed kia estis nia surprizo, kiam en la aŭditorio aŭdiĝis agrabla ina voĉo: „Karaj bulgaraj amikoj, ni salutas vin per malgranda koncerto. . .“ Parolis al ni k-ino Erne Arincevoj kaj ŝia patro Viktor Gruško el Rostov sur Don. Sekvis belega koncerta programo de sovetaj, vietnamaj, ĉinaj, italaj kaj aliaj kantoj, versaĵoj en Esperanto surbendigitaj kaj senditaj al ni — la bulgaraj studentoj-esperantistoj pere de malnova esperantisto k-do Dimităr Dimov, advokato de Varna.

En sia koncerto la sovetaj gekamaradoj parolis kaj kantis pri paco, amikeco, amo, feliĉo. . .

Ni kore dankis al la Rostovaj gekamaradoj-esperantistoj per komuna letero kaj vidindaĵoj de nia ĉarma Varna.

Nadka GANĈEVA,
studentino

Se estas vi fidela
adepto kaj amiko
de lingvo Esperanto
per via eta briko
fariĝu konstruanto
de Esp-a domo bela!

Lazar Mladenov, Sofio . . .	30 lv.
D-ro Iv. Vasilev (pere de M. Conkovski)	10 "
Rajna Arnaudova, Sofio . . .	15 "
Bogdana Popova, Sofio . . .	15 "
Esp. s-to „Fratiga stelo“, Sevelievo	77 "
Esp. s-to „D. Sasonov“, Ase-novgrad	25 "
Esp. s-to „M. Gorkij“, Jambol .	20 "
Esp. s-to „Flamo“, Kjustendil .	7,80 "
Esp. s-to , Svištov . .	7,50 "
Esp. s-to „S. Kalpazanov“ - Velingrad	22 "
Marin Pârlev, Teteven	2,4 "
Vasilij Jakov, Târgoviște . .	2,6 "
Marija Kojareva, Bansko . .	1,5 "
Kiril P. Kostov, Kjustendil .	1,0 "
Stojan P. Kârtev, Ca'apica . .	1,2 "
Donka Abaĝieva, Sofio . . .	25 "
Neofit Spasov, Sofio . . .	25 "
Nikola Aleksiev, Sofio . . .	25 "
Georgi Sotirov, Sofio . . .	25 "
Ivan Malinski, Sofio . . .	25 "
D-ro Tod. Todorov, Sofio . .	25 "
D-ro Stefan Kadiev, Sofio . .	10 "
Ljuben Grozdanov, Sofio . .	5 "
Inĝ. Simeon Simeonov, Sofio .	25 "
Dimităr Motuŝev, Sofio . . .	25 "
Dimo Trudo jubov, Jambol .	184,50 "
Ĉonju Panĉev, Jambol . . .	20 "



KURIOZO DE VIETNAMEA MEDICINO

En aprilo 1961 en hospitalo de la provinco Thaj-Binh, Vjetnamio, oni akuzigis plensukcese ĉe eksterutera gravedo. La naskintino Pham-Thi-Cam, 28-jara, loĝas en vilaĝo Tai-Phong, regiono Tien-Hai, provinco Thai-Binh. Ŝi gravediĝis en la ventra kavo. La feto situis ekster la utero. Ĝia placentoj gluis je la omento, mezentero kaj peritoneo.

Nun la naskito disvolviĝas kaj kreskas normale. Ĝi estas forta. La ekstera formo de la korpo aspektas kiel de normala knabeto, escepte de la kruretoj, kiuj estas falditaj. En la hospitalo oni kuracas la kruojn de la naskito por ĝi ilin normalaj.

Mi sciigas tiun ĉi kazon kiel tre maloftan fenomenon en la medicino.

D-ro Do-ngoc-THUAN,
So-Y-Te Khu-tu-Tri Vlet-Bac,
Vjetnamio

TRA LA GAZETARO

Ĵurnalo „Rabotničesko Delo“ en Sofio (13. XII. 1961) publikigas sub titolo „Fenestro al la mondo“ interesan raportojn pri la varia agado de la Poŝtista Esperantista Societo „Heroldo“ en Sofio.

En ĵurnalo „Oteĉestven Glas“ en Plovdiv (15. XII. 1961) oni legas interesan artikolon „Parko de l' paco kaj amikeco en urbo Debreĉen“ de Ivan Ŝivarov.

En ĵurnalo „Stopanoved“ en Varna (23. XII. 1961) estas publikigita propaganda artikolo „Saluton el urbo Rostovo sur Dono“ de Nadka Ganĉeva, studentino, kaj informo pri fando de Studenta Esperantista Rondo „Studenta Amikeco“.

En ĵurnalo „Pirinsko Delo“ en Blagoevgrad (9. II. 1961) aperis longa propaganda artikolo „Esperanto — rimedo por komunikigo inter la popoloj“ de Marko Veleŭ.

En ĵurnalo „Oteĉestven Zov“ en Vraca (21. XI. 1961) en artikolo titolita „Fenestro al la mondo“ oni publikigas du interesajn leterojn el Nepalo kaj Japanio.

LA VIVO EN ARTEFARITA ORGANISMO

En oktobro 1961 en Moskvo okazis prelego de itala profesoro Danielo Angelo Petruĉi. Nia Akademio de sciencoj invitis lin en nian landon por konatigi nin kun siaj novaj eltrovoj. Liaj laboroj jam akiris famon en la tuta mondo. Li la unua sukcesis ricevi homan embrion aĝan ĉirkaŭ 2 monatojn, ekster la viva organismo. Antaŭnelonge okazis lia renkonto kun niaj rusaj scienculoj en la Konferencsalono de la Akademio de Sciencoj. Akad. Sisakjan en mallonga parolo akcentis la signifon kaj gravecon de la nova eltrovo de Petruĉi. Post tio la itala scienculo mem rakontis pri siaj esploroj. Prof. Petruĉi, komencante la eksperimentojn, havis precizan praktikan celon — trovi metodon de kultivado de histoj por utiligi ilin por transplantado al la homo. En medicino estis konate, ke la homaj histoj ne povas vivi post transplantado al la alia homo. Kultivante homan embrion en artefaritaj kondiĉoj, D. Petruĉi deziris ricevi la histon, kiu bone vivus post transplantado. Li havis nur ĉi tiun modestan celon, sed la rezulto de liaj eksperimentoj superis liajn atendojn kaj eliris pli malproksimen de la antaŭfiksita praktika tasko. Por efektiviĝi la eksperimenton prof. Petruĉi konstruis tiel nomatan „biologian lulilon“, tre komplikite konstruitan. En tiu „lulilo“ estis garantiitaj ĉiuj necesaj kondiĉoj por evoluo de la homa embrio. Diversaj aparatoj kun grandega precizeco subtenis en ĝi necesan temperaturon kaj premon de nutra por la embrio plasmado de sango kaj gasinterŝanĝo. La eksperimento per speciala foto- kaj kinoaparatoj estis fiksita en kinofilmo. Prof. Petruĉi demonstraciis tiun ĉi mirindan filmon dum sia prelego. Sur ekrano oni povas sinsekve trarigardi unu post la alia ĉiujn stadiojn de eksperimento: embriigon de la ovo, evoluon de la embrio, aperon de sangsistemo kaj fine eĉ rudimentojn de kelkaj organoj de la 8-semajna homa embrio.

La prelego de D. Petruĉi pri la vivo en artefarita organismo estis trege interesa.

L. Suetova

*Ni preparu nin bone por
la XXXV nacia Esperanto-
kongreso en Burgas!*

DEZIRAS KORESPONDI

POLLANDO:

Olsztin, ul. M. Rataja 78 m. 2. Awizyn Wal-demar kun filatelisto.

Karol Wierzbicki, Kato wice, ul. Dabrowski-ego 20 B1, bankoficisto.

Junulara esperantista rondo ĉe aprovaĵa teknikumo en Zabrze, str. Klonova 2, kun ĉ. l. interŝ. pm. kaj bk.

USSR:

Estonio, Otepää, Okt, pst. 17, J. Korb pri tajlorarto en Bulgario kaj interŝanĝi sperton.

Litovio — Vygandas Račaitis (studento), Juros 13, Kaunas 21 — pri arto, muziko, literaturo.

BRAZILIO:

F-ino Terezinha Lila Lein (19-jaraĝa), R. Machado de Assis. 675 Uberlândia, M. G. Brazilo
S-ro Erico Vilela Marpes (15-jara), R. Vigario Dantas, 236 Uberlândia, M. G. Brazilo

F-ino Creusa Godoy (22-jara), R. Buenos Aires, 29 Uberlândia, M. G. Brazilo

S-ino Elisa Marquez de Souza Carracedo, R. 15 de Novembro 414, Uberlândia, M. G. Brazilo
S-ro Breno Maluf Wutke (10-jara), p. o. box 206, Uberlândia, M. G. Brazilo.

HUNGARIO:

Esztergons, Molnar, 1/3-Magyarovszag, Jonas Laszlo, instruisto, kun pedagogoj pri diversaj temoj.

Budapest II, Lövöház u. 32.2. Pal Fabulia kun papilokolektantoj el ĉiuj landoj.

ĈEĤOSLOVAKIO:

Kurim u Brna, d-r Vališe 15, Miloš Chlouba, kaj Antonin Chlouba (studentoj) per P I, PM, pri ĉt kun ĉl.

F-ino Eliško Schreiberova (instruistino), Duchovska 5, Teplice V, Cosheeh.

S-ro Jaroslav Sklenar (fervojekspedisto), Strelečka, Ustek. Interŝanĝ. pm.

D-ro Koloman Shovan (veterinaro), Namestie 1 maja 2077, Piestany, interŝ. pm.

S-ro Seidler Zdenek, Těškovice 70, Opavsko, P. Kyjovice.

RUMANIO:

Braila, str. Golești 1, Marian Ghita, oficisto 27-jara, per il. p. k. pm. pri turismo.

Zizi Ghita (25-jara instruistino), str. Golești № 1, Braila — pri turismo k. modrevuoj, il. k. pm., esperantajoj.

ITALIO:

Konata itala muzik-firmao eldonis gramo-fonon diskon kun kanto „Enigmista Junularo“ kantata esperante de M. Mazzoli. La muziko estas bona, la kantataj vortoj amuzigaj. La enrigistigo okazis per orkestro „Verda Stelo“.

La disko (je 45 turn) estas malmultekosta — 5 resp. kuponoj. Por ĝin aĉeti oni sin turnu al Sfinge Manzoni, via A. Chislanzoni 12, Lecco (Como), Italio.

FRANCIO:

Franca esperantistino deziras interŝanĝe gastidum 2—3 monatoj al bulgara samideanino el Varna, Vidin aŭ Sofio. Proponojn direktu al: L. Lentaigne, Av. de la Gaillarde 3, Montpellier.

JUGOSLAVIO, Skukan Viktor, v. dir. Komun. Banko. Pakras, serĉas p. m. interŝanĝidon kun bulgaraj kaj albanaj samideanoj, prefere sportaj en kompletaj serioj. Donas p. m. de Jugoslavio kaj Europo. Certa respondo.

BULGARIO, Sotio, str. „Georgi Dimitrov“ 171, Nadka Radeva, kun per il. pk. kaj leteroj.

BULGARIO:

Sofio, str. G. Dimitrov 171, Nadka Radeva kun ĉl per il. p. k., leteroj.

Varnensko, vil. Belogradec, d-ro Vasil Kurtev, 50-jara veterinaro kuracisto kun Francio, USSR, Italio, Svislando, Ameriko.

Samokov, str. Avksenti Veleški 72, Magdalina Japrankova, lernantino, respondas al ĉiuj letero.

Kalofer, Klimatična gimnazija, Veska Petrova Ĥristova, kun ĉl per il. p. k. Sofio 25, str. Socialistiĉeska pobeda 52,

Rumen Bor. Stojanov, 20-jara pri literaturo, interŝ. pm. il. p. k.

Sofia Esperantista societo „Maksim Gorkij“ organizas leteresperon la 15-an de aprilo 1962. Nepte skribu pri via lando, via vivo kaj laboro! Adreso: Bulgario, SOFIO, p. k. 44.

La Junulara grupo ĉe Esp.-societo „Sukceso“ en Vraca organizos dum aprilo propagandecale ekspozicion pri uzitaj poŝtmarkoj kaj bele afrankitaj kovertoj. Pli valorajn kontribuojn ni rekomencos per donacoj. Same ni serĉas korespondantojn por ĝejnuloj kaj ĝelernantoj (15—28 jaraĝaj). Adreso: Bulgario, Vraca, Tekstila teknikumo, Enjo Daskalov — instruisto.

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktoro), Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: P. Ĉ. Georgieva. Adreso: de la redakcio Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 7-46-01

AĈETU!

LEGU!

Malnovaj ekzempleroj de „Bulgara Esperantisto“

1958 jaro	— 1—10	numeroj, binditaj	. . . 1 lv
1959	” — 2—12	”	0,05 lv. por ekzemplero
1960	” — 1—12	”	0,05 ” ” ”
1961	” — 1—12	”	0,10 ” ” ”
Gazeto „Esperanto“	(bulgarlingva)	0,04 lv.	por ekzemplero
Gazeto „Zamenhof“		0,04	” ” ”
Diplomoj por finita kurso		0,05	” ” ”
„La lernejo kaj Esperanto“	(bulgarlingva)	. . . 0,10 lv.	
„La mondo havas internacian lingvon“	de		
Sarafov — Masârov		0,50	”
„Amika Vjetnamio“		0,70	”
„Sub la jugo“ de Iv. Vazov	(bindita)	 1,73	”
Portreto „Zamenhof“		0,10	”
membro-karto		0,10	”
statuto		0,05	”

Gekamaradoj, faru viajn mendojn ĉe

Bulgara Esperantista Asocio, p. k. 66, Sofio.

Al kolektivaj mendoj — ĝis 40% da rabato.

FARIĜU MEMBRO DE UEA!

Membro-abonanto. Ricevas membro-karton, membromarkojn,
la organon de UEA „Esperanto“

kaj la jarlibron. Kotizo 4,88 lv. jare

Membro-jarlibro. Ricevas membro-karton, membro-markojn

kaj la jarlibron!

Kotizo 2,44 lv. jare.

Urĝe membriĝu, ĉar la akceptebla nombro estas
limigita!

La sumojn sendu al **BEA, p. k. 66, Sofio.**